ISSN 2072-5825

# Espero Katolika




**Numero 10-12/2009**

**Oktobro-Decembro 2009**

**JARKOLEKTO 106 - N. 1059-1061 - Oktobro/Decembro 2009**
*Finpresita la 20.12.09* — Finito di stampare il 20.12.09

**Sur la kovrilo:** *La pordego de la Alta Porpastra Seminario en Vroclavo (Pollando), sidejo de la 19a Ekumena E-kongreso - 62a de IKUE. Foto de Marija Belošević. (v. p. 125-130).*

## ENHAVO

**VI ESTAS FILO DE LA VIVANTA DIO – VI ESTAS ROKO!**
Komento pri **Mateo** 16, 13-20 119
Kion opinias la homoj pri **Jesuo Kristo**? 120

**PAPO BENEDIKTO LA 16-a EN ĈEĤA RESPUBLIKO**
Homilio de la **Papo** en la soleno de sankta Venceslao 121
**“New Age”** estas satana verko 123

**65-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO IJK**
Kardinalo **Vlk** celebris E-Meson en Liberec 124

**LA 19-a EKUMENA E-KONGRESO EN VROCLAVO**
Kompleta **retrorigardo** al la kongresaj eventoj 125
**Poemo:** Ekumena Kongreso 130
IKUE kongresos en **Parizo** 130

**LA ESPERO LAŬ LA ENCIKLIKO DE PAPO BENEDIKTO LA 16-a**
**Prelego** de pastro Forycki dum la EEK 2009 131

**ALTECO** 133
(kromaj) **MOVADAJ INFORMOJ** 134
**FUNEBRE** 135

**Radio Vatikana**, 134

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**
**Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto “ikue-v”** * **Banko:** “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Honora Prezidanto:** Sac. Duilio Magnani - **Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Sac. Attila Szép - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Ĝenerala Sekretario:** Carlo Sarandrea - **Kasisto, direktoro de la C.O.:** Antonio De Salvo - **Estraranoj:** Sac. Gabriel Anda, Sac. Lajos Kóbor, Bruno Masala, Stanisław Śmigielski - **Kontorevizoroj:** Giovanni Daminelli, Pavol Petrík.

# VI ESTAS FILO DE LA VIVANTA DIO – VI ESTAS ROKO!

*de Frato Amadeo*



**Mateo 16, 13-20**

*Kiam Jesuo venis en la regionon de Cezarea Filipi, Li demandis siajn disĉiplojn: "Kiu, diras la homoj, ke la Filo de la homo estas?". Ili respondis: "Iuj diras, ke Li estas Johano, la Baptisto, aliaj, ke Li estas Elija aŭ Jeremia, aŭ iu alia el la profetoj". Jesuo demandis plue: "Sed vi, kion vi diras? Kiu mi estas?". Simon Petro respondis: "Vi estas la Mesio, la Filo de la vivanta Dio". Tiam Jesuo diris al li: "Beata vi estas, Simon Bar-Jona, ĉar nek karno, nek sango instruis vin, sed mia Patro, kiu estas en la ĉielo. Kaj Mi diras al vi, ke vi estas Petro, la Roko, kaj sur tiu roko Mi konstruos mian Eklezion, kaj la pordegoj de la infero ne venkos ĝin. Mi donos al vi la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo: kion ajn vi ligos sur la tero, tio estos ligita en la ĉielo; kaj kion vi malligos sur la tero, tio estos malligita en la ĉielo". Tiam Li admonis la disĉiplojn, ke al neniu ili diru, ke Li estas la Mesio.*

Hodiaŭ Jesuo restadas en la societo de siaj fideluloj, sed ne timu aliĝi al ili ankaŭ vi. Tio, pri kio Li volas kun ili interparoli, estas grava temo, kiu tuŝas ankaŭ vin. Al Jesuo ne sufiĉas, ke vi estas kun Li. Venis la tempo, por ke Li estu inter vi tute klare. Adorkliniĝu antaŭ Li kaj danku Lin, ke Li vin invitis ĝuste en la grava momento, kiam Li volas kun la disĉiploj interparoli pri tiu temo.

Kiam la Sinjoro vin demandas, kiu Li estas, Li ne faras tion, kiel Li ne scius tion. Precipe Li volas, ke vi mem tion bone konsciiĝu. Enmense trairu ĉiujn, kiuj vivas ĉirkaŭ vi. Diru al Li laŭvere, kion vi pri tio scias. Ne timu paroli ankaŭ pri tiuj imagoj, kiuj Jesuon malestimigas, misprezentas, humiligas, subtaksas aŭ ofendas. Diru al Li ankaŭ pri tiuj, por kiuj Li restadas tute nekonata. Ĉu vi konsciiĝas, kion oni devas fari, por ke ĉiu tiu nesciado, supraĵeco, antaŭjuĝoj kaj malamo transformiĝu en la veran ekkonon pri Jesuo al ni sendita de la Patro?

Sed la Sinjoro volas aŭdi ankaŭ de vi, kion vi diras, ke Li estas. Sed ne rapidu respondi. Dume vi bone enrigardu vian koron. Antaŭ ol respondi vi mem, disponigu lokon al Simono, kiu volas ekparoli nome de ĉiuj: Vi estas la Kristo, la Filo de la vivanta Dio.

Se vi konsentas kun la apostolo, sekvu atenteme la respondon de Jesuo: Li laŭdas Simonon ne pro tio, kion li diris, sed pro tio: ke li senkondiĉe akceptis tion, kion al li revelaciis la Patro mem. Memorfiksu tion kaj rememoru tion, kiam vi komencos eksenti memplaĉon de tio, kio al vi ŝajnas "via", kvankam devenanta de la Patro. Pli prefere pripensu tion, kion al vi la Patro povus revelacii, se tion ne obstaklus ĝuste via tromemfido.

La demando de Jesuo estas grava ĝuste tial: de tio, kion ni pensas, ke Li estas, dependas ĉio, kion Li povas al ni revelacii. Kiel vi vidos, la Sinjoro rekompencas la sincerecon per sama sincereco. Se vi laŭvere konfesos, kion vi diras, ke Li estas, Li al vi respondos, kion Li diras, ke vi estas.

Tion, kion Jesuo volas diri pri sia apostolo Simono, Li povas proklami nur kiel Dio. Ĝuste tial Li bezonis unue lian publikan kreddeklaron. La solena proklamo de la Sanktoleita Filo de Dio ne estas adresita nur al la apostolo. Ĝi estas la promeso kaj la plej alta garantio de konsolo por ĉiuj kristanoj: Sur vi mi konstruos mian Eklezion, kiun la potenco de la infero ne superfortos. Ĉu surprizas vin, ke Li volas ĝin fondi sur malforta, malklera, eferveska fiŝkaptisto? Ne miru kaj ne timu. Kiel Petro ne ekkonis de si mem, kiu vere estas Jesuo, tiel ankaŭ lian Eklezion li ne portos mem. Atentigadi nur pri la homo signifas ignori ĝuste tiun altencelan Dian planon: eĉ ne la homa malforteco kapablas malebligi la depratempan Dian planon. Dio realigos siajn decidojn eĉ fronte al la danĝeroj, tra kiuj antaŭeniras la Eklezio de Kristo. Se la inferaj potencoj ne prezentus konstantan realan danĝeron, estus bezonataj neniuj promesoj, ne estus senco pri io paroli. La batalo kun la malhelaj regnoj de la malbono plenigos esencan parton de la estonta historio de la Eklezio. Ne ekzistos en ĝi periodo, en kiu la Malbonulo ĉesas ĝin minaci: foje tio estos la sanga persekutado, alifoje herezaj instruoj, foje tento de la gloro, potenco kaj riĉeco, poste denove malŝparemo kaj la homa fiereco fondita jen sur la racio, jen sur la progreso kaj bonstato. Ĝuste kaŭze de tiu konstanta batalo estos necese fari gravajn kaj devoligajn decidojn. Al tio servos la ŝlosiloj de Petro. Se Dio konfidos al iu respondecon, poste Li ankaŭ mem lin respektas. Tio estas esprimo de la Dia grandanimeco kaj potenco. La kompetenteco de Petro estas la senpoveco de Satano. Dubigi tiun kompetentecon, rezigni pri ĝi signifas forlasadi firman fundamenton kaj suriri la akvon, sed ne je la alvoko de Majstro, sed je propra decido.

La papeco reprezentas por la Eklezio firman kaj kunigantan forton: sen ĝi ekestas nur novaj kaj novaj frakcioj. Ĉiuj skismoj estas en sia kerno kontraŭ Petro.

Nun estiĝis la momento, por ke ankaŭ vi konfesu al Jesuo, kiu Li estas. De tio dependas la graveco de ĉio, kion vi de Jesuo aŭdos. Ĝis vi prezentos al Li vian konfeson, atenteme aŭskultu, kion la Sinjoro konfidos al vi. Kaj ne forgesu: neniu tasko, neniu misio estas malgranda, eĉ, ne duaranga. Sed ĉiu donaco de Dio signifas ankaŭ respondecon.

Plie, ne misaŭdu la konkludajn vortojn: Ne parolu pri tio. Ekzistas aferoj, kun kiuj oni ne iras al la foiro. Por ke la homoj akceptu kompletan veron, ili devas unue pri ĝi esti konvene disponigitaj.

*Ho, kiel senfunda estas la Dia donacemo, saĝeco kaj ekkono! Kiel netrapenetreblaj estas liaj decidoj! Al Li estu gloro ĝiseterne!*

## KION OPINIAS LA HOMOJ PRI JESUO KRISTO?

Joh 1,6. 19-28

Por Johano la Baptisto Jesuo estis pli granda ol li, por la sinedrio li estis granda nekonato. Kiu estas Jesuo por la hodiaŭaj homoj, por ni?

– por la antaŭjuĝemaj: mita persono kies instruo estas miksaĵo de paganaj instruoj aŭ de kumrana skolo.

– por la senpartiecaj: sociala reformisto, libermovada gvidanto, religia geniulo.

– por la indiferentuloj: ideala homo, eble ankaŭ Dio, sed pri tio ili ne interesiĝas, ili ne estas fanatikuloj, sian entombigon ili volas havi kristana.

– por la kredantoj: homo, sed ankaŭ la Filo de Dio, sendito de la Patro, nia Sinjoro.

# PAPO BENEDIKTO LA 16-a EN ĈEĤA RESPUBLIKO


*En la tagoj de la 26-a ĝis la 29-a de septembro 2009 okazis vizito de Papo Benedikto la 16-a al Ĉeĥa Respubliko. Li vizitis urbojn Prago, Brno kaj Stará Boleslav.*

## HOMILIO DE LA PAPO DUM LA MESO EN LA SOLENO DE SANKTA VENCESLAO

**Stará Boleslav, la 28-a de septembro 2009**

*Sinjoroj kardinaloj, respektindaj fratoj en la episkopeca kaj sacerdoteca servoj, karaj fratoj kaj fratinoj, karaj junaj geamikoj,*

kun granda ĝojo mi renkontiĝas kun vi hodiaŭ matene, kiam proksimiĝas la fino de mia apostola vojaĝo en la amata Ĉeĥa Respubliko. Ĉiujn mi kore salutas, precipe la sinjoron kardinalon ĉefepiskopon, al kiu mi dankemas por la vortoj, kiujn li vianome diris al mi komence de tiu ĉi eŭkaristia soleno. Mian saluton mi adresas ankaŭ al pluaj kardinaloj, episkopoj, sacerdotoj kaj konsekritaj personoj, al la reprezentantoj de la laikaj movadoj kaj asocioj, kaj precipe al la junularo. Mi bonvenigas la sinjoron prezidenton de la respubliko, al kiu mi gratulas okaze de lia nomtago; la bondezirojn mi sendas al ĉiuj, kiuj havas la nomon Václav (Venceslao), kaj al la tuta ĉeĥa popolo en la tago de ĝia ŝtatfesto.



*Homilio de la Papo en sankta meso celebrata en solenaĵo de la martiro sankta Venceslao en Stará Boleslav* *Foto de Filip Kotek*

Hodiaŭ matene ĉe la altaro nin unuigas glora rememoro pri la martiro sankta Venceslao, al kies relikvoj mi antaŭ la sankta meso omaĝis en la baziliko al li konsekrita. Per sia sango li aspergis vian teron. Lia aglino, kiun vi elektis kiel emblemon de mia vizito ĉi tie – antaŭ momento tion memorigis via kardinalo ĉefepiskopo – estas historia simbolo de la sublima ĉeĥa nacio. Tiu granda sanktulo, kiun vi volonte nomas "eterna" princo de la ĉeĥoj, nin invitas, por persiste kaj fidele sekvi Kriston, instigas nin, ke ni estu sanktaj. Li mem estas modelo de sankteco por ĉiuj, precipe por tiuj, kiuj direktas la sortojn de la socio kaj de la nacio. Sed ni demandas: ĉu la sankteco en la nuntempo estas ankoraŭ aktuala? Aŭ ĉu ĝi preferinde estas io, kio estas malmulte altiranta kaj negrava? Ĉu oni ne serĉas hodiaŭ prefere sukceson kaj la homan gloron? Sed kiel longe daŭras kaj kian valoron havas la surtera sukceso?

La pasinta jarcento – kaj via lando estis atestanto de tio – vidis fali ne malmultajn potenculojn, pri kiuj oni opiniis, ke ili atingis preskaŭ kapturnajn altecojn. Kaj subite ilia potenco estis for. Tiuj, kiuj negas Dion, kaj sekve de tio ili malhavas estimon por la homo, havas – ŝajne – facilan vivon atingante materian su-

kceson. Sed sufiĉas nur enrigardi sub surfacon kaj ni konstatas, ke tiuj homoj estas malfeliĉaj kaj malkontentaj. Nur tiu, kiu konservas en la koro sanktecan "Dian respekton", havas fidon ankaŭ al la homo kaj kapablas dediĉi sian vivon al la kreo de pli justa kaj frateca mondo. La nuntempo bezonas homojn "kredantajn" kaj "fidindajn", pretajn disvastigi en ĉiun sferon de la socio tiujn kristanajn principojn kaj idealojn, al kiuj inspiriĝas ilia agado. Tio estas la sankteco, la universala stato de ĉiuj baptitoj, kiu ilin kondukas al fidela kaj kuraĝa plenumado de iliaj devoj, por ke ili ne celu la propran egoisman intereson, sed la komunan bonon, kaj ĉiumomente ili serĉu la volon de Dio.



Bonvenigo de la Papo post lia alveno
*Foto de Filip Kotek*

En la evangelio ni rilate al tio aŭdis: "Ĉar kiel profitus – diras Jesuo – la homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus sian animon?" *(Mat 16,26)*. La Sinjoro nin tiel instigas al konsciiĝo, ke la veran valoron de la homa ekzisto oni ne povas mezuri nur per surteraj havaĵoj kaj pasemaj interesoj. Ne estas tio materiaj objektoj, kiuj kapablas kontentigi la treegan sopiron kaŝitan en la koro de ĉiu homo trovi la sencon de sia vivo kaj feliĉon. Tial Jesuo ne hezitas proponi al siaj disĉiploj "mallarĝan" vojon al sankteco: "Kiu perdos sian vivon pro mi, tiu trovos ĝin" *(kp. Mat 16,25)*. Kaj hodiaŭ matene Li klare ripetas: "Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin, levu sian krucon kaj sekvu min." *(Mat 16,24)*. Certe, ĝi estas malmola parolo, malfacile akceptebla kaj realigebla. Sed la atestado de la sanktuloj kaj sanktulinoj al ni pruvas, ke tio estas ebla, se la homo sin konfidas al Kristo kaj fidas al Li. La ekzemplo de la sanktuloj kuraĝigas ĉiun, kiu sin nomas kristano, por esti fidinda, do vivi laŭ principoj de la kredo, kiun li konfesas. Vere ne sufiĉas nur ŝajnigi sin bona kaj honesta homo; estas necese efektive tia esti. Kaj bona kaj honesta estas tiu, kiu ne kovras per si mem la lumon de Dio, ne altigas sin, sed li lasas pere de si tralumi Dion.

Tio estas ankaŭ instruo el la vivo de sankta Venceslao, kiu kuraĝis doni preferon al la ĉiela regno antaŭ la ĉarmo de la surtera potenco. Lia rigardo neniam forturnis sin de Jesuo Kristo, kiu por ni suferis, kaj donis tiel al ni ekzemplon, ke ni sekvu Lin, kiel skribas sankta Petro en la dua legaĵo, kiun ni ĵus aŭskultis. Kiel obeema disĉiplo de la Sinjoro, la juna princo Venceslao restis fidela je la instruo de la evangelio, kiun al li enkapigis lia sankta avino, martirino Ludmila. Tial ankoraŭ antaŭ ol li komencis la konstruon de pacema kunvivado en sia patrujo kaj kun najbaraj landoj, li zorgis pri firmigo de la kristana kredo. Tial li venigis sacerdotojn kaj konstruigis preĝejojn. En la unua praslava "legendo" ni legas, ke li "asistis al la servantoj de Dio, multajn preĝejojn ornamis per oro" kaj ke "al ĉiuj malriĉuloj li faris bonfarojn, nudulojn vestigis, malsatulojn satigis, vojirantojn akceptis laŭ la vortoj de la evangelio, la vidvinojn ŝirmis kontraŭ maljusteco,

ĉiujn homojn, malriĉulojn eĉ riĉulojn li amis". Laŭ la Sinjoro li lernis esti "kompatema kaj favorkora" *(Resp. psalmo)* kaj plenigita per la spirito de evangelio li kapablis eĉ pardoni al sia frato, kiu klopodis ĉesigi lian vivon. Tial vi prave lin nomas "heredanto" de via nacio kaj, en al vi bone konata kanto, vi lin petas, ne



Adiaŭo de la Papo kun ŝtatprezidento Václav Klaus
*Foto de Jan Handrejch*

ebligi, ke la nacio pereu.

Venceslao mortis kiel martiro pro Kristo. Estas interese rimarki, ke Boleslav pere de fratmurdo konkris la pragan princan seĝon, sed la krono, kiun poste surmetadis sur la kapon liaj sekvantoj, ne portas la nomon de Boleslav. Male ĝi portas la nomon de sankta Venceslao, por atesto, ke "la trono de la reĝo, kiu juĝas mizerulojn juste, staros eterne". Tion oni povas kompreni kiel miraklan intervenon de Dio, kiu ne forlasas siajn fidelulojn: "La senkulpulo venkobatita venkis kontraŭ kruela malamiko same kiel Kristo surkruce" *(kp. Legendo pri sankta Venceslao),* kaj la sango de la martiro ne vokis al malamo kaj venĝo, sed al pardono kaj paco.

Karaj fratoj kaj fratinoj, ni danku kune en tiu ĉi Eŭkaristio al la Sinjoro, ke al via patrujo kaj eklezio Li donis tiun ĉi sanktan reganton. Samtempe ni preĝu, por ke ankaŭ ni kiel li per decidema paŝo ekiru al sankteco. Ĝi estas kompreneble malfacila, ĉar la kredo estas konstante elmetata al multaj provoj; sed se ni lasos nin altiradi de Dio, kiu estas Vero, nia paŝo iĝos firma, ĉar ni ekkonos la forton de lia amo. Ni ricevu tiun gracon propete de sankta Venceslao kaj de pluaj sanktaj protektantoj de la ĉeĥaj landoj. Ŝirmu nin kaj nin ĉiam helpu la Virgulino Maria, Reĝino de la Paco kaj Patrino de la Amo.

Amen!

## "NEW AGE" ESTAS SATANA VERKO

Meksika Ĉefepiskopo Kardinalo Norberto Rivera Carrera indikis la idean enhavon de New Age (nova epoko) kiel satanan. La Eklezio devas kondamni ĉion, kio estas kontraŭ Dio, kiel sorĉarto, okultismo, magio, esotero, horoskopoj, kartaŭguro kaj framasonismo. Li tion proklamis en internacia konferenco pri ekzorcismo (31.8.-2.9.2004) en Mexico City. Inter 500 partoprenantoj estis ankaŭ pastro Gabriele Amorth, konata roma ekzorcisto kaj fondinto de Internacia Asocio de Ekzorcistoj.

La Eklezio nun troviĝas en decidiga fazo. Ni devas uzi la Dian vorton kaj fortimige publikigi ĉion, kio ne estas de Dio. Ankoraŭ pli malbona estas, ke en multaj urboj de la mondo okazadas satanismaj ritoj. New Age kaj la satanaj verkoj klopodas enkapigi al la homoj falsajn pensadojn kaj falsan bildon pri Dio. Ne estas heroldata kredo je unu persona Dio, sed oni sugestas al la homoj, ke "ni mem estas dio". La homoj solvas siajn problemojn per supraĵa maniero sen rilato al la persona Dio. Sed nia centro devas esti Kristo, kiu venkis per sia morto kaj resurekto kontraŭ satano.

# 65-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO KUN ESPERANTLINGVA SANKTA MESO EN LIBEREC

*En urbo Liberec (Ĉeĥio) okazis dum la semajno antaŭ la UK en Bjalistoko, do paralele kun la 19-a Ekumena E-Kongreso en Vroclavo, en la tagoj de la 18-a ĝis la 25-a de julio 2009 la 65-a Internacia Junulara Kongreso. Partoprenis en ĝi 300 gejunuloj el 40 landoj: junaj homoj el diversaj nacioj, religioj, lingvoj kaj politikaj opinioj. Pere de la Internacia Lingvo Esperanto ili pridiskutis la temon "Libereco, 20 jarojn post la falo de la fera kurteno". La 66-a IJK en 2010 okazos en Kubo. Kadre de la IJK en Liberec okazis ankaŭ sankta meso en Esperanto. Pri tiu ĉi ĝojiga evento raportas juna frato Petr Adam Dohnálek, komitatano de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio.*

Pli ol duonjaron antaŭ la komenco de la Internacia Junulara Kongreso en Liberec ni eksopiris okazigi dum la dua kongresa tago, en la dimanĉo, la sanktan meson en la internacia lingvo. Post sensukcesa petado de kelkaj pastroj kapablaj celebri la liturgion (ili ne povis aŭ tempe aŭ loke), fine surprize la ĉefepiskopo de Prago, Lia Eminenco Kardinalo Miloslav Vlk, jese respondis mian leteron kaj konsentis kun ĉiuj aferoj de mi proponitaj: fariĝi honora membro de la Ĉeĥa Esperanto-Junularo, transpreni la patronecon de la kongreso kaj li promesis veni mem al Liberec, por celebri esperantlingvan sanktan meson.

Por ebligi plenan partoprenon en la liturgio ankaŭ al la partoprenontaj ĉeĥoj, nekomprenantaj Esperanton, mi preparis dulingvajn mestekstojn, kiujn poste ĉiuj ĉeestantoj ricevis. La tekstoj estis necesaj ankaŭ por partoprenintaj esperantistoj, ĉar ili, kvankam katolikoj, nur malofte havas la eblecon partopreni la meson internacilingve celebritan kaj tial ili ne konas la tekstojn parkere.

Multaj lokuloj kaj ankaŭ aliaj nekongresanoj ĉeestis, ĉar la sankta meso estis anoncita en ĉeĥaj katolikaj gazeto, radio kaj televido, krome en multaj retpaĝoj. Tiamaniere la meso akiris ankaŭ iomete propagandan karakteron: la reagoj de la lokuloj al la fremdlingva Diservo estis agrable surprizaj, kontraŭe al mia supozo, tre pozitivaj. Ankaŭ la patro kardinalo liaesprime estis ĝojigita pro nia invito, kiel li sin esprimis en la Ĉeĥa Radio unu tagon antaŭ la meso. Kun la ĉefcelebranto Lia Eminenco Kardinalo Miloslav Vlk la liturgion kuncelebris ĉefdojeno František Opletal, pastro Attila Szép el Hungario kaj eksesperantistaj pastroj Michal Podzimek el Liberec kaj saleziano Jozef Kujan el Rumburk.



*Mescelebro en Liberec: Kardinalo Miloslav Vlk kaj pastro. Attila Szép el Hungario.*
*Foto de Bohumil Blahuš*

Post la liturgio sekvis komuna tagmanĝo kun la reprezentantoj de la kongreso kaj de la paroĥo en la paroĥejo. Dum ĝi ni interparolis kun la kardinalo preskaŭ nur esperantlingve, kio al li kaŭzis iom da malfacilaĵoj precipe pro la simileco kun la de li aktive regata itala lingvo, tamen li kapablis bone respondadi, kvankam jam pli ol kvardek jarojn li ne praktikadas la lingvon. Danke al Dio ĝi estis bela dimanĉa travivaĵo.

*Petr Adam Dohnálek*

# LA 19-A EKUMENA E-KONGRESO EN VROCLAVO

*De la 18-a ĝis la 25-a de julio okazis en belega loko de la pola urbo Vroclavo la 19-a Ekumena E-Kongreso (62-a de IKUE kaj 59-a de KELI). Ke la kongreso estis agrabla kaj tre sukcesa aranĝo, tion certe asertas pli ol ducent ĝiaj partoprenintoj el 19 landoj.*



*Katedralo de sankta Johano la Baptisto*

La kongreso okazis en la Alta Porpastra Seminario. La temo de la kongreso estis prenita el la Unua Letero de apostolo Paŭlo al la Korintanoj, ĉapitro 13, versiklo 13: "...fido, espero kaj amo, tiuj tri" kun la aldono "espero kristana aŭ monda senespero".

Altaj protektantoj de la kongreso estis la prezidanto de Vroclavo s-ro Rafał Dutkiewicz kaj s-ro Ryszard Czarniecki, deputito de la Eŭropa Parlamento.

Honoraj protektantoj estis: Mons.Marian Gołębiewski, Ĉefepiskopo kaj Metropolito de Vroclavo, Mons. Henryk Kardinalo Gulbinowicz, emerita Ĉefepiskopo de Vroclavo, Jeremiasz Anchimiuk, Ĉefepiskopo, Episkopo de la Pola Memstara Ortodoksa Eklezio kaj Prezidanto de Pola Ekumena Konsilio, Włodzimierz Juszczak, Episkopo de la Ukraina Grek-Katolika Eklezio, Mons-ro Ignacy Dec, Episkopo de Świdnica, Ryszard Bogusz, Episkopo de Evangeliana-Aŭgsburga Eklezio, Prof. D-ro Marek Bojarski, Rektoro de la vroclava Universitato.



*La Episkopo de Evangeliana-Luterana Eklezio Ryszard Bogusz kaj la katolika Episkopo Edward Janiak dum solena malfermo de la kongreso*

Plejparto de la kongresanoj atingis la kongreslokon sabate. Vespere sabate okazis en la seminaria kapelo solena inaŭgura ekumena Diservo. Dimanĉe antaŭ-tagmeze okazis apartaj Diservoj. Por la evangelianaj kongresanoj ĝi okazis en luterana preĝejo de la Dia Providenco; por la katolikaj kongresanoj estis la sankta meso en la preĝejo de la Plejsankta Virgulino Maria sur Sablo. Kaj la solena malfermo de la kongreso, kiun prezidis Miloslav Šváček, prezidanto de IKUE, okazis en la belega salonego "Aula Leopoldina" en la Vroclava



*Inaŭgura sankta meso en la preĝejo de la Plejsankta Virgulino Maria sur Sablo en Vroclavo. De dekstre pastroj: Stanisław Pawlaczek, Mons. Lionginas Vaičiulionis, Stanisław Płachta, Bernhard Eichkorn, diakono Janos Kirsch kun filo, Pierluigi Svaldi kaj Roman Forycki.*

Universitato. Krom la kongresanoj la solenan malfermon ĉeestis ankaŭ altestimataj reprezentantoj de la urbo, eklezioj kaj organizaĵoj. La katolikan eklezion reprezentis Lia Ekscelenco Mons. Edward Janiak, Episkopo de Vroclavo; la evangelianan-luteranan eklezion, lia episkopa Moŝto Ryszard Bogusz; la grek-katolikan eklezion, honorinda pastro Bogdan Drozd; la altan porpastran seminarion, ĝia rektoro sac. Rafał Kowalski. La urban registaron reprezentis s-ino Iwona Bugajska; la deputiton de la Eŭropa Parlamento anstataŭigis D-ro Piotr Wierzbicki; la vroclavan Universitaton, s-ino vic-rektorino Teresa Loś-Nowak kaj la Silezian E-Asocion, ĝia prezidanto s-ro Adam Pleśnar.



*S-roj Miloslav Šváček kaj Carlo Sarandrea kun Honora Protektanto de la kongreso Lia Eminenco Kardinalo Henryk Gulbinowicz*

La ekleziaj kaj urbaj reprezentantoj prezentis siajn salutparolojn. Grandan aplaŭdon rikoltis la evangeliana-luterana episkopo Ryszard Bogusz, ĉar li sian suficê longan salut-alparolon deklaris en Esperanto. Sekvis ankaŭ alparoloj de la prezidanto de Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista Prof. Boĵidar Leonov kaj de la prezidanto de Silezia E-Asocio s-ro Adam Pleśnar.

La kulturan parton realigis junaj violonistino Joanna Lisiecka kaj pianistino

Paulina Mazur. Konklude s-ro Mariusz Domaszevicz kantis en Esperanto kanton *Ave Maria* de la komponisto Franz Schubert. La dimanĉan solenan tagon konkludis kantkoncerto en Esperanto de s-ino Jadwiga Dzięgielewska.

La lunda antaŭtagmezo estis dediĉita al du prelegoj pri la kongresa temo. La ĉefprelegon prezentis prezidanto de KELI frato Philippe Cousson; sekvis prelego de prezidanto de TOLE Prof. Boĵidar Leonov. La tagmeza komuna preĝo okazis en ortodoksa preĝejo de s-taj Cirilo kaj Metodio. La posttagmeza tempo estis disponigita al vizito de la urbaj vidindaĵoj. Kultura vespera programo (koncerto de religia poezia kanto) okazis en la grek-katolika preĝejo fare de pastro Bogdan Drozd. Post ĝi okazis perŝipa ekskurso sur rivero Odra por vidi la lumigatan urbon Vroclavo.




*Interparolo de Stefan Lepping, kongresa orgenludanto, kaj pastro Bernhard Eichkorn kun Popo en la ortodoksa preĝejo.*

Marde antaŭtagmeze prelegis pastro Roman Forycki pri la temo: "Espero por la mondo laŭ vidpunkto de papo Benedikto la 16a". Post li prelegis Prof. Endre Dudich pri: "Tero, ĉielo kaj espero – Geologio kaj teologio". La tagmeza preĝo okazis en la katolika preĝejo de La Plej Sankta Nomo de Jesuo. Posttagmeze okazis plua prelego de Prof. Endre Dudich:




*Kongresanoj antaŭ la Alta Porpastra Seminario en Vroclavo - la kongresejo*



Kastelo Książ, la plej granda en Malsupra Silezio

"Ami kaj agi fidante – Albert Schweitzer kaj Patrino Tereza".

Posttagmeze ankaŭ okazis orgenkoncerto de Ernst Leuze en la evangeliana-luterana preĝejo de Dia Providenco. Vespere okazis vokalista recitalo de Paweł & Władysław Salik kaj Antoni Walaszek kun akompano de Wojciech Ławnikowicz.

Merkrede okazis perbusa tuttaga ekskurso al Świdnica, Książ kaj Szczawno Zdrój. En Świdnica oni vizitis la evangelianan lignan "Preĝejon de la Paco", kiu estas en la listo de la Monda Kulturheredaĵo de UNESCO. Poste sekvis vizito de ankaŭ belega katolika katedralo, en kiu okazis la esperantlingva sankta meso.

Sekvis vizito al kastelo Książ, la plej granda en Malsupra Silezio kaj tria laŭ grandeco en Pollando. Kaj lasta estis la vizito al kuracloko Szczawno Zdrój. Alveturinte al la urbo estis videbla granda surskribo, per kiu la urbo bonvenigis la kongresanojn. Krom ĝuo de la urbaj vidindaĵoj okazis tie honore al la kongresanoj koncerto. En la urba parko oni ankaŭ vizitis ŝtonon kun memortabulo, kies surskribo informas, ke en 1902 loĝis en Szczawno Zdrój kiel kuracgasto D-ro Ludoviko Zamenhof, kreinto de



*Surkorte de la kastelo Książ*



*Dumekskursa merkreda koncerto en kuracloko Szczawno Zdrój*

la internacia lingvo Esperanto.

La ĵaŭda antaŭtagmezo estis dediĉita al la Ĝenerala Kunveno de IKUE kaj Jarkunveno de KELI. Posttagmeze okazis sankta meso en la impona katedralo de sankta Johano la Baptisto, kiun ĉeestis ankaŭ la honora protektanto de la kongreso Lia Eminenco Henryk Kardinalo Gulbinowicz. La evangeliana Diservo samtempe okazis en la luterana preĝejo de s-ta Kristoforo.



*Danka meso en la Katedralo de sankta Johano la Baptisto*

Vespere oni ĝuis la muzikkoncerton en dudek lingvoj prezentitan de franca kantisto kaj esperantisto JoMo (Jean-Mare Leclercq).


En la vendreda antaŭtagmezo okazis prelego de Siegfried Krüger pri “Bonhoeffer kaj la Ekumeno.” Poste sekvis prelego de Marija Belošević pri “Sankta Francisko: paco kaj bono” kaj prezentaĵo de Miloslav Šváček pri la pasintjaraj aranĝoj.

La tagmeza preĝo okazis en la grek-katolika preĝejo de s-taj Vincento kaj Jakobo.

Dum posttagmezo oni povis ankoraŭ viziti urbajn vidindaĵojn aŭ senpage viziti




*Parto de la kongresanaro en parko antaŭ la kongresloko - La Alta Porpastra Seminario*



*Sub ombro de la katedralo kaj sub ŝirmo de Kristo la Reĝo okazis la kongreso*

la admirindan botanikan ĝardenon kaj prepari sin por la adiaŭa vespera programo, kies populara gvidanto estis la ĝenerala sekretario de IKUE frato Carlo Sarandrea.

Sabate matene post la sankta meso kaj ekumena matena preĝo okazis oficiala fermo de la kongreso fare de la prezidanto de KELI frato Philippe Cousson.

Ankoraŭ menciindas aldoni, ke ĉiutage matene krom dimanĉo, merkredo kaj ĵaŭdo okazis en la seminaria kapelo la rozaria preĝo, post ĝi la sankta meso kaj la ekumena matena preĝo. La vesperaj programoj estis fermitaj per ekumena vespera preĝo.

Nur koncize mi priskizis la kongresan semajnon por tiuj, kiuj ĝin ne partoprenis.

La neĉeeston de tiel belega kristana esperantista aranĝo povas bedaŭri tiuj, kiuj pro ne gravaj kaŭzoj rezignis pri ĝia partopreno. La benitajn kongresajn tagojn sukcese partoprenis ankaŭ gefratoj blindaj kaj handikapitaj.

*Miloslav Šváček*

## I.K.U.E. KONGRESOS EN PARIZO, EN SIA JUBILEA JARO

Antaŭ 100 jaroj por la unua fojo niaj pioniroj kongresis en Parizo. Komenciĝis la mirinda atesto de asocio, kiu, malgraŭ multaj malfacilaĵoj, klopodis doni al la mondo la ateston de la katolikaj Esperantistoj. Nepras "reveni al Parizo", ne nur por omaĝi al niaj karaj pioniroj kaj inde soleni gravan datrevenon, sed ĉefe por halti momenton kaj revui, kiom eblas, ĉi tiun jarcenton da esperantista katolikeco, por poste restarti per nova elano. Ni kongresos ĉe la Sankta Koro de Jesuo, en la samnoma Baziliko en Montmartre de la 27-a de junio ĝis la 3a de julio 2010. Por plenaj detaloj, aliĝilo kaj kotizoj: http://www.ikue.org/kong2010/index.htm



*Alta porpastra seminario – la kongresejo*

## EKUMENA KONGRESO

En Vroclavo estis grava kunveno,
venis kristanoj por ekumeno.
Kunligis ilin kruc´ de l´ Sinjoro,
la verda stelo kaj unu koro.
Petis pri gracoj samideanoj,
ĉar ĉiuj estas Diaj infanoj.
En unu lingvo petegis Dion,
por ke Li benu verd-familion.

*Bogusław Sobol*

# LA ESPERO LAŬ LA ENCIKLIKO DE PAPO BENEDIKTO LA 16A

***Prelego de pastro Roman Forycki okazinta la 21-an de julio kadre de la 19-a Ekumena E-Kongreso en Vroclavo, Pollando***

### 1. La grava tasko de la ekumena kongreso

Partoprenante la 19-an Ekumenan Esperanto-Kongreson ni havas laŭvican ŝancon interŝanĝi niajn pensojn kaj sentojn rilate al nia kristana vivo. Sendube al ĝiaj fundamentoj, krom fido kaj amo apartenas la espero. Estas fakto, ke niaj pensoj kaj sentoj pri tiuj kristanaj fundamentaj virtoj ne ĉiam estas samaj. Ili estadas malsamaj ne nur inter diversaj kristanaj konfesioj, sed ankaŭ inter la samaj konfesianoj.

Pro tio la interŝanĝo de iliaj propraj pensoj kaj sentoj estas tiel grava. Oni tiam povas ne nur korekti propran pensmanieron, sed antaŭ ĉio riĉigi ĝin.

### 2. Profundigi kaj riĉigi i. a. la konon de la espero

Entreprenante la temon de la espero oni povas konsideri ĝin diversmaniere; oni povas paroli pri propraj, tre individuaj vidpunktoj, aŭ oni povas paroli pri la oficiala instruado tiuteme en propra konfesio, aŭ oni povas ankaŭ paroli pri la diversaj tute unuopulaj interpretoj de la Biblio. Memkompreneble la Biblio estas fundamento de la pensmaniero por ĉiuj kristanoj. Sed pri ĝi povas esti diversa instruado ne nur en diversaj, sed ankaŭ en la sama konfesio, ĉar la esperon oni povas esplori kaj konsideri el diversaj vidpunktoj.

### 3. Ankaŭ koni la papan instruon pri la espero

Por ke la interpretoj de la Biblio ne estu tro subjektivaj, helpas la ekleziaj aŭtoritatuloj kaj la eklezia tradicio. Por la katolikoj al la plej grandaj aŭtoritatuloj apartenas la Papo. Pro tio lia instruo, precipe oficiala, pri la kompreno de la Biblio, estas por la katolikoj la plej grava. Ĝi ankaŭ havas precipan valo-ron en la interkonfesia dialogo. Pro tio ankaŭ la instruo de la Papo Benedikto la 16a pri la espero en lia encikliko "Spe salvi", t. e. "Per espero savataj", estas tiel grava kaj bezonata.

### 4. Konscii pri la kialoj de la eldono de la papa dokumento pri la espero

La Papo antaŭ ĉio rimarkas, ke la kristana espero travivas sian krizon ne nur en la mondo, sed ankaŭ en la Eklezio, kaj ke tiu ĉi krizo en la vivo de la kristanoj estas unu el ĉefaj kaŭzoj de la krizo de tiu ĉi espero en la mondo.



Li ankaŭ rimarkas, ke la krizo de la kristana espero montriĝis precipe en la unuaj jarcentoj de la moderna epoko, kaj ke unu el la ĉefaj kaŭzoj de tiu krizo, la komenco de la amasa foriro de la homoj for de la kristana espero, estis Francisko Bacon. Li ekproponis al kristanoj novan esperon, kiu ne devis jam esti la espero de eterna vivo, sed la espero de la feliĉo kaj paradizo sur la tero. Kaj por atingi tion oni ne bezonas kredi je Dio, sed sufiĉas tiucele profiti sciencon kaj teknikon.

Kaj bedaŭrinde multaj homoj ekkredis al li, ke la perditan iam feliĉon en paradizo oni povas atingi pli rapide per la scienca kaj teknika regado de la homo sur la mondo, kaj ke tre rapide alvenos la tempo, kiam oni ne bezonos eĉ kuiri kaj nur gluti la tablojdojn ne bezonante labori.

Tiamaniere ekestis nova espero, kiu baziĝis ne sur la promesoj de Dio, sed sur la homa intelekto kaj ties libereco, kredante al ili senlime kaj malakceptante aliajn aŭtoritatojn,

precipe moralajn kaj religiajn. Kaj kiel preskaŭ unika aŭtoritato restis la devizo: “Sapere aude”, t. e. “Kuraĝu scii”.

Rezulte de tiuj novaj dogmoj estis la agadoj, por kiel eble plej rapide ŝanĝi la mondon. Unu el ili estis la franca kaj poste la rusa revolucioj kaj la ekonomia kaj politika pensmanieroj kaj disvolvigo de la pensmaniero pri la paradizo, sed nur sur la tero kaj sen la helpo de Dio.

La Papo rimarkas, ke ankaŭ la nuntempo kolektas la fruktojn de tiu ĉi pensmaniero, montrante, ke la tiel nomata nova espero estas tute iluzia kaj kontraŭa al la evoluo de la homo.

### 5. Montri al la mondo la veran vizaĝon de la espero

La Papo tamen ne nur rimarkas tion, kiel historian proceson de foriro de la kristanoj el la kristana espero. Li ankaŭ donas konkretajn proponojn, kiamaniere sanigi la malsanon de la kristana vivo kaj eliri el tiu iluzia espero, kiun donas la mondo.

La unika vojo al tio estas reveni al vere kristana espero, al espero, kiu ne trompas la homon, sed gvidas lin al la vera celo de lia vivo, al kiu li estas vokita. Oni devas nepre foriri de la espero, kiu limiĝas al tiu ĝistempa mondo. Oni devas ŝanĝi la pensmanieron, niajn parolojn kaj agojn tiel, ke ili atestu pri la ekzisto de Dio kaj de la eterna vivo. Oni devas montri al la mondo alian vizaĝon de la espero.

### 6. Forigi la kialojn de la malvera kaj malkristana espero el la vivo de la kristanoj kaj zorgi pri la espero por ĉiuj

Papo Benedikto proponas al ni ankaŭ ekvidi, agnoski kaj forigi la kialojn de la malforteco kaj malkristaneco de nia espero kaj montras, ke unu el tiuj kialoj estas ĝia individualismo kaj egoismo. Kaj tiu individualismo kaj egoismo de nia espero montriĝas precipe tiam, kiam ni penas esperi sole, ne atentante la proksimulon kaj lian esperon. La kristano, laŭ la Papo, ne rajtas vere esperi nur por si mem, sed li devas ankaŭ zorgi pri la espero de la proksimulo tiel, ke li ankaŭ havu la esperon de la eterna vivo, ĉar la zorgo nur pri propra espero estas kontraŭ la kristana amo de Dio kaj de la proksimulo.

La Papo forte substrekas, ke la kristanoj ofte estis forgesantaj pri tio, ne nur en pasintaj jarcentoj, sed ankaŭ en tempoj al ni pli proksimaj kaj ankaŭ nuntempe. Eĉ, memorante pri la propra eterna vivo, ili forgesas pri la samo por siaj proksimuloj. Ili forgesas, ke esperi kristane ĝuste signifas esperi la atingon de la eterna feliĉo ne nur kun Dio, sed ankaŭ kun niaj proksimuloj.

Ĝuste pro tio la individualisma espero estas unu el la plej grandaj minacoj de nia kristana espero, ĉar sen la amo ĝi ne estas kristana. Laŭ la Papo ĝi estas ankaŭ unu el la ĉefaj kialoj de la kritiko kontraŭ la kristanoj, ĉar en la Eklezio oni ne ĉiam konsideris la savon kiel la komunuman realaĵon, kiun anoncas la letero al Hebreoj.

Jam en la unuaj jarcentoj de la Eklezio, kiel ni vidis, oni klare kaj forte substrekadis, ke la individualisma espero estas fonto de la dividoj en la Eklezio kaj pro tio ĝi estas eĉ peko kaj ties frukto estis ankaŭ la konstruado kvazaŭ de la nova turo de Babelo.

### 7. Konsciiĝi, ke ne nur la kristanoj, sed ankaŭ la mondo bezonas nepre la kristane komunuman esperon

Pro tio oni devas nepre revenigi la komunuman karakteron de la espero en la vivon de la kristanoj. Pri tio parolis jam s-ta Aŭgusteno meditante pri la esenco de la homa feliĉo. Li starigis tiam la demandon, ĉu la homo povas esti feliĉa sola. Kaj trovinte la respondon en la Psalmo 144, kiu anoncas, ke “feliĉa estas la popolo, kies Dio estas la Sinjoro”, li konkludas, ke “por esti feliĉa oni devas esti kun aliaj”. Liaopinie la homo ne povas esti feliĉa ne feliĉigante la proksimulojn kaj ne kreante nek disvastigante la komunumojn de vere esperantaj homoj. Jam la espero de la atingota feliĉo estas feliĉiga kaj tiu, kiu donas ĝin, feliĉigas.

### 8. La sperto de la jarcentoj

La bezonon de la komunuma espero ege sentis kaj travivadis Moseo kaj la apostolo Paŭlo. En la 19-a jarcento same travivadis ĝin sankta Vincento Pallotti kaj en la tempo de la 2a Vatikana Koncilio travivadis tiun ĉi problemon la granda koncilia teologo Henri

de Lubac (1896-1991). En sia verko *"Catholicisme. Aspects socials du dogme"* (Katolikismo. La sociaj aspektoj de la dogmo) li skribis i.a.: "Ĉu mi trovis la ĝojon? Ne – respondas li tuj - mi trovis nur mian ĝojon. Kaj tio estas io tute alia. Ĉu la ĝojo povas esti individualisma? Ĉu estas vera ĝojo nur pri la propra savo, kiu ne kontraŭdiru al la kristana espero?". Laŭ de Lubac la espero de la eterna vivo ne estas la espero nur pri la propra savo, ĉar la mesaĝo de Jesuo Kristo estas adresata ne nur al la individuaj personoj, sed ankaŭ al tutaj societoj kaj eĉ al la tuta homaro. Jesuo volas esti la espero por la tuta mondo. Li venis en la mondon por savi ĉiujn homojn kaj tion ege substrekas i. a. s-ta apostolo Petro. Ĝuste pro tio Jesuo ankaŭ fondis la Eklezion.

### 9. La plej grava tasko de la kristanoj kaj precipe de la kristanaj esperantistoj

Pro tio inter la plej gravaj taskoj de la kristanoj estas la kreo de komunumoj de la homoj havantaj la saman esperon – la esperon de la eterna vivo. Kaj kiel kristanoj ni estas respondecaj pri tio kaj des pli kiel kristanaj esperantistoj. Pri la komunumoj en la Eklezio kaj pri la komunumoj de la Eklezio kun la mondo. Kaj finfine pri la plej granda ne nur tutmonda komunumo, sed ankaŭ pri la ankoraŭ pli granda komunumo de la savitaj kaj plene feliĉaj ĉielanoj.

En tiu ĉi senco Esperanto realigas ne nur la surterajn celojn, sed ankaŭ la celon, kiu estas la eterna vivo ne nur por unuopaj homoj, sed ankaŭ por ĉiuj socioj kaj por la tuta homaro. La E-movado faras tion per la komuna lingvo kaj spirita ligilo. Kaj tiamaniere ĝi realigas ne nur la volon de la homoj, sed ankaŭ la grandan atendon de Dio pri la interfratiĝo kaj la savo de ĉiuj homoj sendepende de ilia raso, religio, sekso, nacio kaj de aliaj diferencoj, kiuj ne kontraŭstaras al tiu celo. Esperanto do montras sian altvaloron kiel ilo, kiu rapidigas la proceson de la surtera kaj ĉiela unuiĝo de la homoj kaj vere esperantigas ilian ĝistempan vivon.

### 10. La perspektivo de nia agado

Se mi rajtas ion proponi, mi proponas iri pli kuraĝe al nia kristana kaj esperantista celo anoncante nian vere esperigan esperon t. e. la kristana espero. Ni diru al nekristanoj, ke ili bezonas tian esperon, kiun donas al ni Jesuo Kristo. Ni helpu al tiuj, kiuj havas malfacilaĵojn kun tia espero. Ni kreu komunumojn, en kiuj ni povas proponi nian pretecon, por helpi al aliuloj en iliaj unuigaj kaj ekumenaj laboroj. Ni parolu kaj skribu pri niaj personaj kaj komunumaj spertoj, ĉar en multaj niaj iniciatoj en la kampo de la E-movado ni estas veraj pioniroj. Eble tiuj ĉi spertoj estos utilaj al la aliaj homoj, eble nia ekumena agado en iuj niaj iniciatoj povas esti modelo ankaŭ por neesperantistoj kaj eĉ por nekredantoj, por agi pli socie kaj pli fervore. Konsiderindaj estas ankaŭ la manieroj de la plibonigo de niaj reciprokaj rilatoj, por esti pli ekumenaj kaj pli malfermitaj al la diferencoj, kiuj ne detruas la proceson de la homa unuiĝo.

Kaj ni faru ĉion por tio, ke finfine plenumiĝu nia espero pri la tempo antaŭdirita de Jesuo Kristo, kiam ekestos unu ŝafaro kaj unu paŝtisto. Sed ni devas memori, ke tio ekestos nur tiam, kiam nia espero estiĝos komunuma. Tio estas la kondiĉo, kiu estas plenumenda, por ke plenumiĝu la promesoj de Kristo!

## ALTECO

La vivo kromalie havas ankaŭ regulojn. Tio validas en voja trafiko, scienca esploro kaj sporto.

Se la futbala pilko aperos post tuŝlinio, ĝi estas tiel dirite ekster la ludo kaj arbitrulo ekfajfas interrompon de la ludo. Kiel alten povas flugi la pilko, nenie en la regularo estas difinite, ĉar oni tute racie opinias, ke eĉ ne la plej bona ludanto ĝin piedbatos ĝis la ĉielo.

***Alivorte...***

*La futballudejo estas per siaj reguloj limigita nur en horizontalaj dimensioj. En alteco tute ne. En la reguloj de multaj homoj ĝi estas tute kontraŭe.*

*D-ro Max Kašparů*

## (kromaj) MOVADAJ INFORMOJ

### INTERRETE

**LA KRISTNASKA MESAĜO DE LA GARDANTO DE SANKTA LANDO** (franciskano kun Episkopa rango), ankaŭ ĉi-jare, dank' al Marija Belošević, aperis rete ankaŭ en Esperanto. Inter la iamaj Gardantoj, oni memorigas kun plezuro patron Carlo Cecchitelli, esperantiston *(informis: Antonio De Salvo).*

**LA PAĜARO DE IKUE** (ikue.org) havis dum 2009 8.219 vizitojn. La plej "svarmaj" tagoj estis tiuj de januaro (1.166 vizitoj), aprilo (1.389) kaj decembro (1.026), koincide kun la publikigo de la papaj mesaĝoj jarkomence, Paske kaj Kristnaske.

**PER LA ENRETIGO DE EK 7-12/1992**, la kvara plej dika iam ajn aperinta numero, oni atingis 20 kompletajn jarkolektojn en www.esperokatolika.org. Tiu numero entenas, i.a., la historion de IKUE (ĝis 1983). Fine de 2009 la arkivo enhavis 200 kompletajn numerojn.

**LA ELSENDOJ EN ESPERANTO DE RV** enarkivigitaj je: www.radio-vatikana-esperanto.org ekde la 8an de novembro 2009 estas 750. Preskaŭ ĉiuj elsendoj de 2005 ĝis hodiaŭ (plus kelkaj de 2004) ĉeestas.

### PERSONE

**DUM LA PREĜTAGOJ EN CZĘSTOCHOWA**, okazintaj de la 17-a ĝis la 18-a de oktobro 2009, estis anoncite, ke fratino Janina Trzpil rezignis de la funkcio de Landa Reprezentantino de IKUE por Pollando kaj ke ŝi retiriĝis de ĉiu alia agado. IKUE dankegis ŝin pro ŝia longjara aktiveco en la movado: ankaŭ por la lastaj preparoj por la Preĝtagoj en Klara Monto ŝi multe aktivis *(informis: Stanisław Śmigielski).*

**FRATO GIOVANNI CONTI,** konata IKUE-ano, iniciatinto de la E-ĉeesto en placo sankta Petro, starigis ĉirkaŭ sia loĝdomo la "ĝardenon Esperanto", daŭre prilaborata. Nun eblas vidi per Interreto la bildojn de lia kreaĵo, je la adreso: http://www.giardinoesperanto.com/

### ELDONAĴOJ

**"L'AVVENIRE",** la ĵurnalo de la itala katolika episkoparo publikigis la 6-an de oktobro 2009 tre favoran artikolon pri Esperanto, menciante ankaŭ IKUE'n Titolo: "Kaj Esperanto (antaŭen)iras".

**HISTORIO DE LA ESPERANTISTA GRUPO DE TOURS (1905-2005).** Francio rolis grave en la disvolviĝo de la katolika Esperanto-movado. Kaj tutaparte francoj el Touraine, kiel p. Peltier. La komitato de FKEA/ACFE rekomendas legi la libron de Dominique Baron (prezidanto de la Kultura Centro Esperanto-Touraine): Historio de la esperantista grupo de Tours (1905-2005) Prezo: 24,50€ (20,50+4 por afranko). Mendu ĝin al: Dominique BARON, 15 impasse MARAT, 37700 St PIERRE-DES-CORPS.

**RADIO VATIKANA - Elsendoj en Esperanto**

*La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama* **horo 21.20 MET (20.20 UTC)**

**DIMANĈE - daŭro 9'20"** - frekvencoj: *MO* 585,1530 kHz - *KO* 4005, 5885, 7250, 7435 kHz. *Satelite:* Eutelsat 2 (13° E) transponder 54 (Bouquet Sky), vertikala polarizado, 11804 Mhz, aŭdkanalo E, 128 Kbit/s.

**MERKREDE KAJ ĴAŬDE - daŭro 9'** - frekvencoj: *MO 1260, 1611 kHz - KO* 6185, 7355 kHz. *Satelite*: Eutelsat 2 (13° E), vertikala polarizado, frekvenco 11804 MHz, dua aŭdkanalo (TelePace), FEC 2/3, S.R. 27.500. **Interreto:** http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp. *Granda arkivo:* http://www.radio-vatikana-esperanto.org.

HEROLDO DE ESPERANTO, trisemajna informa gazeto pri la E-mondo, estas de 1920 je la servo de nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo. 17 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, kongresaj numeroj ktp. Eldonas, posedas kaj administras: LF-koop. Mendu provekzempleron ĉe: Heroldo de Esperanto, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

# *Ni funebras kaj kondolencas*

Nur lastdate la C.O. de IKUE eksciis pri la forpaso de



**Frato René-Jean MARMOU (1920-2008)**

okazinta la 24-an de aprilo 2008. Ni publikigas parton el la biografiaj notoj, eldiritaj de lia ordena superulo dum la funebra rito por li, la 28-an de aprilo 2008 en La Houssaye-en-Brie (Francio).

Frato René-Jean Marmou naskiĝis en la lando de vinberĝardenoj, sur la deklivoj de Blaye, Gironde (Francio). Tio okazis en 1920, la 16-an de decembro, en vilaĝo Braud-et-St Louis. Lia patro nomiĝis Petro, lia patrino Maria. Li ŝatis diri, ke li havis la saman aĝon de Papo Johano Paŭlo la 2a. Li estis baptita la 9-an de januaro 1921 en la preĝejo de la vilaĝo. De sia naskiĝloko li ĉiam konservis la akcenton, kun aparta eldirmaniero de la "ro-j". 25-jara li eniris la seminarion por plenkreskaj pastraj vokiĝoj de Gauriac en sia diocezo. Li restis tie dum du jaroj, kiam li ankaŭ estis federacia sekretario de la kampara katolika agado. Li alvenis en La Houssaye-en-Brie (Seine-et-Marne) en 1949, kiam li estis 29-jaraĝa. La 25-an de marto 1950 li eniris la religian kongregacion de la Fratoj Misiistaj kaj Fratinoj de la Kamparoj (Frères Missionnaires et Soeurs des Campagnes, FMC), kaj 4 jarojn poste (la 25-an de aprilo 1954) li eldiris la porĉiaman voton en la preĝejo, kie li estis baptita. Frato René-Jean estis la unika fratulo de la ordeno kun longa barbo; alia unikaĵo estis, ke li pasigis sian tutan vivon en la ordena Priorejo Sankta Marteno en Houssaye-en-Brie. Tie, komence, li estis flegisto, sed ĉefe, dum 60 jaroj, matene kaj vespere, piede aŭ bicikle, li estis la kuriero al kaj el la vilaĝa poŝtoficejo. Aliaj gravaj servoj, kiujn li prizorgis same dum preskaŭ 60 jaroj estis la sekretaria laboro por la Kroniko de la ordeno kaj la paroĥa agado en Neufmoutiers. Post kreo kaj evoluigo de la abelujaro en la Priorejo, li ekkontaktis aliajn abel-bredistojn de la regiono. En 1968 li fariĝis gvidanto de la abelujaro-lernejo en la Ĝardenoj de Luxembourg de Parizo: li konservis apartajn rememorojn pri tiu periodo, kiam li travivis la eventojn de la "franca majo 1968". En 1973 li komencis teoriajn kaj praktikajn kursojn pri la arto bredi abelojn (li havis 115 lernantojn en 1974): pro sia agado li ricevis el la manoj de la tiama Prezidanto de la franca Senato la Medalon je terkultivista merito (kiun oni vidas sur lia brusto en la supra fotografio). Kiel abel-bredisto li vizitis plurajn naciajn kaj internaciajn kunvenojn; li estis unu el juĝistoj por la jaraj premioj de la terkultivista Foiro en Parizo. Por ĉiuj, kiuj vizitadis la Priorejon Sankta Marteno en Houssaye-en-Brie li estis "frato abelo" aŭ "frato mielo": li ĝojis vendi la produktaĵojn de sia laboro. Esperantisto de jardekoj, li estis DM de IKUE: kun prava fiero li atentigis, ke lia membrokarto havis numeron 1. Dum multaj jaroj li estis aktiva membro kaj religia konsilanto de Franca Katolika Esperanto-Asocio (FKEA). Laŭ la rememoro de lia regiona ordena superulo, frato René-Jean ne havis elmontreman karakteron, li ne indulgis en konfidencoj. Sed la maniero, laŭ kiu li travivis malfacilajn vivomomentojn, estis admirinda. Kiam li devis rezigni je la laboro, translokiĝi al domo por maljunuloj en Sens, aŭ kiam li devis ekuzi rulseĝon por moviĝi, fariĝante pli kaj pli dependa de la aliaj, li ĉiam konservis internan pacon kaj sian kapablon rideti. Esperanto ĝisfine ege gravis por li: responde al kondolenca letero sendita de FKEA, lia religia kunfrato Paul Morel sciigis: "Dum la lastaj vivomonatoj frato René-Jean tiom suferis, ke li estis enhospitaligita. Tie li reagis foje parolante lingvon, kiun neniu rekonis. Ĝi estis Esperanto".

## S-ro Jiří LAUBE (1923-2009)



Nia kara IKUE-ano Jiří Laube naskiĝis la 19-an de januaro 1923 en civito Klapý pod Hazmburkem. Ambaŭ liaj gepatroj, Robert Laube kaj Emilie Nedělková, prizorgis terkultivadon kaj bredadon. Junie de 1942 Jiří abiturientiĝis kromalie kun specialiĝo en la franca kaj germana lingvoj; la lernado de lingvoj estis cetere lia la plej granda ŝatokupo dum la tuta vivo. Dum la dua mondmilito li lernis ankaŭ la hispanan. Post la milito li enskribiĝis en la universitaton, sed en 1948 li estis forpelita pro sia malkontento pri komunisma ŝtatpotenco. Li edziĝis kaj daŭrigis sian laboron kiel tradukisto en Ústi nad Labem ĉe la loka labor-buroo, kiel jam dum la milita tempo en Libochovice. Lia vivo komencis koni persekutadon, kiam li komencis aktivi en la Ĉeĥoslovaka Popola Partio en Ústí nad Labem. En Februaro 1954 kune kun aliaj 4 membroj de la ĈPP li estis arestita kaj enkarcerigita en Litoměřice. Sekvis periodo de malmolaj pridemandadoj ĝis la komenco de novembro 1954, kiam okazis juĝproceso. La verdiktoj estis tre malmolaj: Jiří estis kondamnita je dumviva enkarcerigo, la ceteraj membroj de la grupo je 15 ĝis 25 jaroj da mallibereco. La apelacia kortumo konfirmis la verdiktojn kaj Jiří estis enkarcerigita en Praha-Pankrác, kie li havis diversajn sanproblemojn. Post kuracado, li devis labori en ercminejo "Vojna" en Příbram (hodiaŭ ĝi estas la Muzeo de la viktimoj de komunismo). Ĉar tiutempe la leĝaro ne plu permesis dumvivajn enkarcerigojn, lia puno estis ŝanĝita je 25-jara mallibereco. En 1958 la puno estis denove ŝanĝita je 15-jara. Ankaŭ lia edzino Marie ricevis kondamnon de 3-jara mallibereco, kiu kostis al ŝi 14-monatan restadon en la karcero de Bratislava, ĉar ŝi ne denuncis sian edzon pro la partopreno en la kunvenoj de la Kristan-demokratoj. En 1960 Jiří ĝuis liberiĝon pro amnestio kaj li fariĝis manlaboristo de paperfabriko en Štětí, poste li estis helplaboristo ĉe masonistoj en Roudnice nad Labem, kie lia familio ekloĝis. Ĉar li estis rehonorigita nur en 1990, li ne povis ĝis tiu tempo trovi kvalifikitan laboron, por eluzi siajn lingvajn kapablojn. Li emeritiĝis januare de 1983, daŭrigante sian intelektulan agadon. Liaj ŝatokupoj estis prefere lingvoj, precipe Esperanto, ankaŭ studoj pri historio, filozofio kaj socialaj sciencoj. Li fondis la E-klubon en Roudnice. Al liaj ĉefaj intereskampoj en la movado apartenis religia agado - aparte la ekumena strebado - kaj organiza kaj faka laboroj en scienco kaj tekniko. Dum 20 jaroj li estis sekretario de scienc-teknika sekcio de ĈEA kaj dank' al li la sekcio atingis rimarkindajn rezultojn. Jiří ankaŭ instigis aperon de kelkaj fakaj eldonaĵoj. En E-o li publikigis diversajn eseojn, inter kiuj estas "Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo? Jes, sed nur per demokratia simbiozo de la kulturoj" (1989) kaj vasta esploro pri la lingva problemo en la Eklezio, kiun li havigis al la landa episkopara konferenco en 1990. Notindas ankaŭ liaj klopodoj utiligi E-on en internaciaj kaj diversaj neesperantistaj movadoj en Ĉeĥio. Li forpasis la 18-an de septembro 2009.

## S-rino Teresa LONGONI

La 16-an de novembro 2009 forpasis en Milano (Italio), post longa malsano, sinjorino Teresa Longoni, fratino de pastro Ferdinando, iama Prezidanto de IKUE kaj de mons-ro Lorenzo, kiu en Milano daŭrigis lian esperantistan agadon. Post la forpaso ankaŭ de la dua frato, Teresa konservis kontaktojn kun la Katolika E-Centro de Milano: por la monataj Mesoj en E-o ŝi prizorgis kantojn kaj orgen-ludadon. De 6 jaroj pro sanstato ŝi forlasis ĉiun agadon, kvankam restante membrino de la itala sekcio de IKUE. En la funebra rito, celebrita en ŝia paroĥo en Milano, partoprenis grupo de lokaj esperantistoj.